



Eldonas : Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 18 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (14 FF en Francio)
Poŝtkonto : 3 371 74 M. Bordeaux * al la ĉi-apuda pĉk.

la kastelnova grupo

TREJNADO...



Struto

Certe ne pro ia agrablo
kapon li kaŝas en la sablon?

Elreviĝo

Unue ŝi opiniis lin Goliato
Poste konstatis : malbona plagiato

Al prudulino

Mia karulino
kial ĉi inklino ?
Vi jam nudas
kaj plu prudas !

Ne tiel ĉi

Estis ŝi jam en plenrava nudo,
Sed li aktivis kiel testudo.
La ago ŝin tiom impresis
Ke jam matene lin forgesis.

Pri homoj

Unu estas katoliko
kaj alia nur amiko!

Noktoj da timo

Ho! Sinjorino!
Estas viktimoj
pro vi k. timo.

Tiel naskiĝas neologismoj

Vere bela juna paro
iris kune tra arbaro.
Li atakis ŝin sur musko.
Jen nova noci' : ambusko!

Edzino

Jen la adjektivo
Por la vira vivo.

Ŝajnas

Ŝajnas ke, vero nuda
treege estas pruda !

Alvoko al esperantistoj

Kune fratoj
al rebatoj!

Se!

Se ekaktivos Eros
iu baldaŭ esperos!

Pri lignajisto

Ĉiun atendas lia verko
Ĉi el la ligno de kverko!

El sturmo

Eksturmis li ŝian remparon
Nun havas da infanoj paron.

Pri parolemulo

Se ne ŝia emo monologa
certe ege estus ŝi alloga.

Al samideano

Verdstelan'! Mi petas vin
amike
Laboru aktive, ne E-fike.

Pri revoluciulo

Aktivi li multe penis
Sed ĉu iu lin komprenis?

Klaĉoj

Jen instigoj
por intrigoj.

Antoni Madej

*
*
*
*
*
*
*
*
*
*
*

Ĉ U M I T A P R O L E T A R A

R E V O L U C I O ,

Ĉ U K O N S T R U A D O D E T U J A

A L T E R N A T I V A S O C I O ?

Mi kredas, ke ĉiuj interkonsentas pri la neebleco de proleta revolucio, almenaŭ en la plej multaj cirkonstancoj (eble iam ĝi okazis en Aragono, eble iam en okcidenta Ukraino, kvankam kunvivintoj de tiuj eksperimentoj havas tre malsimilajn opiniojn). Do komunumoj estas la plej taŭga solvo. Oni grupiĝas, kreas etan socion, kie oni klopodas efektiviĝi alian vivmanieron. J.G. mencias Usonon kaj okcidentan Germanion, do landojn, kiuj havas socian kaj ekonomian sistemon similan al la nia, en aliaj landoj oni ĝis nun ne vidas komunumojn aŭ eble nur escepte. Ĉu la homoj tie havas aliajn emojn? Tute certe ne. Cetere, kial sin limigi je la dudeka jarcento, ĉu la nunaj komunumoj ne estas nova nomo de la falansteroj, kiuj floris en la 19a jarcento? Ĉu ili ne dependas de la cetera socio, kiu ilin ebligas aŭ malebligas? Mi ne "ĵaklinigos"* mian kontribuon per detala analizo de komunumoj, tamen ni vivis iam en unu en FR Germanio, kiu cetere ne longe vivis. El la komunumoj de mi konataj precipe en Germanio, ĉiuj sin vivtenis per tipe "kapitalismaj" rimedoj, pluraj per vendado de narkotaĵoj, aliaj per vendado de memfaritaj juveloj (kio supozigas eksterajn klientojn kun aĉetpovo akirata per rimedoj konformaj al la kapitalisma socimodelo far de tiuj klientoj) aliaj fiaskis pro nekapablo sin vivteni per la malfacila agrikulturo. Aliaj limigis la laboron, sendante unu el siaj anoj post la alia al vivtena laboro, de kiu nelaborantoj profitas kaj poste profitigos la aliajn. Tiu sistemo havas multajn avantaĝojn, la ĉefa estas, ke eblas dediĉi pli grandan parton de sia vivo al aliaj okupoj ol vivtena laboro. Bedaŭrinde, ĉiuj, kiujn mi konis, fiaskis, ĉar kelkaj membroj ne deziris fari tiun laborservon. Estiĝis do tendenco al du klasoj en la komunumo, vivtenigantoj kaj profitantoj. Aliaj komunumoj sukcesis pro tre forta komuna

idealo (precipe religia aŭ mistika) kiel ekzemple tiu de Lanza del Vasto aŭ eĉ la malpli laŭdinda aŝramo de Hare-Kriŝnistoj. Komunaj ecoj estas la starigo de malgranda socio, kie oni vivas laŭ sia deziro, sed ĉiam dank'al la radikoj en la malamika ĉirkaŭmedio. Cetere komunumo ne ĉiam estas libero, ĉar la eliro ne ĉiam estas facila en la kazo de religiaj komunumoj, ekzemple, se oni eniris juna en Kriŝna-Aŝramon, ne eblas ĝin facile forlasi, ĉar oni ne ricevis tie fakinstruadon nek ĝuas socian asekuron. Mi ne volas intermiksi politikajn kaj religiajn komunumojn, sed citas ekzemplojn konatajn de mi, ĉu la sama tendenco ne estus observebla en ĉiuj ekstersistemaj etaj socioj ?

Vivi en komunumo estas laŭ mi ebleco por kelkaj, dum la plej multaj per alia sinteno (certe kondamninda) ebligas al ilin sin "nutri" per rilatoj kun la ĉirkaŭmedio. Sed en ili mi ne vidas eblecon solvi la ĉefajn sociajn problemojn. Ili similas la "rabistojn" de la juna Schiller, oni kreas bandon, kiu atakas la maljustan socion kaj starigas en la grupo justan socion, sed ĉu ĝi eblus sen la maljusta ĉirkaŭmedio ?

Noto : Neniu miskomprenu min, ne konante Ŝiler'on. (Tiun teatraĵon "La Rabistoj" esperantigis Zamenhof mem). La "Rabistoj" de Ŝiler tute ne estas banditoj, male ili estas pli simpatiaj kaj honestaj ol la ekstera mondo. Mi uzis nur la komparon kun tiu teatraĵo por montri, ke nia debata temo ne estas tiel nova kiel ni eble kredas.

* "ĵaklinigi ion" : skribi longan artikolon (vidu Laŭte, januaro 81)

Robert Pontnau.

* *
*

Estis la pastroj kaj inkvizitoroj de ateismo. Estis amasoj da laboruloj murdataj en laboristaj demokratioj. Estis la burokratoj de memmastrumado, la prizongardistoj de libereco, la soldatoj de paco, ktp... Iuj diras ke ni travivas mortadon de ideologio. Nu...Des pli bone ! Plej valora revolucio estas mem mastri sin.

Ne ekzistas mastroj sen sklavoj, nek reĝo sen regatoj... Nek iam estis ekspluatantoj kaj estroj sen obeemaj salajruuloj.

Urĝas pensi pri ionalian fari ol voĉdonadi. Pro tio mi taksas tre interesaj ĉiun provon kaj sperton alternative vivadi ĉar tiuj eksperimentoj emfazas afekcion kaj ekzistadon malfavore al ideologia intelektismo kio, laŭ mi, estas restaĵo de religio kaj masklismo (virecismo). Sed ni priatentu la kaptilon : regajno de la alternativaj proponoj far la socia kaj ekonomia sistemaro. Por ne esti tiel integreataj ni priatentu ne instaliĝi en mensa kontentiĝo kaj komforto sed kapabli konstante mem juĝi sin.

Tute samcele niaj iniciatoj estu gvidataj per socia projekto. Mi opinias, ke tiu projekto devus esti tiu de abolo de plej moderna superrega aparato kiu iĝas pli kaj pli ĉie-esta kaj ĉiopova : la ŝtato.

Ĉu historio de l'homaro ne estas tiu de luktado inter subpremado kaj ribelemo ? inter trudado kaj ĝuemo ?

patriko.

* *
*

Pastroj promesis al ni eternecon ; politikestroj estas pli modestaj, ili promesas nur sepjarajn periodojn... Grava evoluo, ĉu ne ?

Sed nia vivo estas muna, kaj iom mallonga : ni do agu tuj, kaj ĉi tie. Kion ni revas fari, ni faru nun, laŭ niaj rimedoj, kompreneble ; sed ni ne atendu, ke ĉiuspecaj estroj akceptu plenumi siajn promesojn. Kaj ni anstataŭigu la frazon "la povo estas ĉe la pinto de la pafilo" per "la povo estas ĉe la pinto de la sperto".

Mi pli kaj pli opinias, ke la "politika" ago, almenaŭ laŭ la tradicia senco, estas vana, kaj anstataŭ provi ekhavi la "politikan" povon, ni provu niajn ideojn, per sperto. Ege interesaj estas agadoj de kelkaj grupoj, kiuj provas, kaj kelkfoje sukcesas, estigi novajn rilatojn inter homoj. Kaj ŝajnas ke tiaj agadoj estos pli kaj pli oftaj pro la perfidoj de ĉiuj malnovaj pastroj, ĉu politikaj ĉu religiaj.

La nura taŭga povo estas je la povo de l'imgo !

Jako.

"Proletara revolucio" aŭ "laborista revolucio" ne aspektas al mi kiel ĝustaj eldiroj. Ĉar ĉu homo valoras nur kiel laboristo? Ĉu nur laboristoj, per sia labora organizado, sia laborista povo, povas ŝanĝi socion, sukcesi revolucion socialisman?... Ĉu ni ne devus diri "homara revolucio" aŭ "revolucio de la mensoj" aŭ "konsciigo de la homaro"?

Por starigi justan socion, paceman, klasa konscio ne sufiĉas. Redukti la valoron de la vivo al la laborista vivo, estus eraro, ĉar ĉiu homo rajtas dece vivi, sendepende de sia produktiveco.

Sed same erara estus rapide kondamni la politikajn partiojn, la sindikatojn, la voĉdonadon, ktp... Ĉar estas pli facile detrui ol konstrui, negative kritiki ol provi kompreni, esti pasiva ol aktiva.

Laŭ mi, neniam, solvo estas definitiva kaj ununura.

Ni devas konscii, ke homaro estas en universo, kiu senĉese evoluas, ke ne eblas eskapi al tiu movo, ke homaro estas nur eta parto de universo, ke universo ne apartenas al la homaro.

Ni devas konscii, ke la ekonomiaj problemoj kaj sekve la politikaj kaj la sociaj, sur nia planedo, estas solidaraj, ligitaj. (Ekzemple, sufiĉas ekzameni, kompari kio okazas en landoj el Sud-Ameriko, el nigrula Afriko, en Pollando, en Francio...) Necesas por la plimulto defendi sian rajton vivteniĝi. Sed ĉiam temas pri detruigo de potencoj, privilegioj ne nur materiaj, sed ankaŭ kulturaj, ideologiaj, pri dispartigo de riĉaĵoj, posedaĵoj.

Estas necese frakasi tiun "sorĉan cirkolon" per ekkonscio pri la "makanismoj".

Revolucio socia sukcesos, kiam la plejmulto el la homaro estos revolucia en si mem, por si mem.

Serĉi alternativojn, kuraĝe, aktive provi siajn ideojn, ne rezigni, strebi al pliboniĝo de la sociaj kondiĉoj, atente, lūcide rigardi, senti, aŭdi... jen sinteno necesa por helpi al homara revolucio.

Sed ĉu sufiĉa? Ĉu homoj vere kontrolas la fortojn, kiujn ili movkomencas? Ĉu ili estas konsekvencaj kaj sufiĉe grandanimaj? La "danĝero" de tiuj ĉi diskutoj estas intelektismo aŭ babilademo. Sed mi esperas, ke ĉiu partopreno estas nur enkonduko al propra medito - sen ia ajn pretendemo.

Nicole.

* ĉu bankrotis la racio ?

Jen plia vidpunkto!

Ĉu necesas tiom diskuti pri tiu temo? Efektive, kiel diras inkamarado Lépeix, racio estas komponanto de la homa menso... samegale kiel mistikismo, aŭ mistika sento, generanto de religiismo, samkiel racio estas generanto de laikismo.

La diferenco inter ambaŭ kuŝas en tio, ke racio estas intelekta kapablo objektivite koncepti rilatojn inter la diversaj modalecoj de la realeco, kaj tiel havigi al si, post eksperimentado aŭ propra spertado, realan bazon, ĉu materialan, ĉu spiritalan (jes!) por apogi sian vivagadon, dum mistikemo estas nur emo, tio estas: subjektiva sencia impresio, kiu esperigas aŭ malesperigas, ĝojigas aŭ malĝojigas, certigas aŭ malcertigas laŭ la cirkonstancoj, blinde, senvole, kvazaŭ plumo en ventokirliĝoj.

Fakte, ambaŭ, mistikismo kaj raciismo, signas du sinsekvajn stadiojn de la spirita homevoluo.

Dum in- aŭ virhomo ne kolektis sufiĉe da vivospertoj aŭ ne sufiĉe utiligis siajn intelektajn kapablecojn, estas memkompreneble ke li aŭ ŝi daŭre alkroĉiĝu al konceptoj - kelkfoje nur mediaj influoj - truditaj aŭ nur senpripense uzitaj de la infanaĝo kaj kiujn ŝi aŭ li ne kapablas plene kompreni kaj refuti se necese. Homo bezonas esperon. Tion ja scias la paradiz-brokantistoj, la bonkoraj paŝtistoj, kiuj, nepostulite de ili, paŝtas la diajn ŝafojn pro amo al Dio... ankaŭ por regule melki, tondi kaj buĉi ilin. Sed pri tio oni kutime ne pensas. Sin trudas al mistikistoj nur la bildo de bonkora dia paŝtato, kiu, oferinte sian vivon por siaj ŝafoj, kondukas ilin (jes! post mortem!) al novaj verdaj herbejoj, kaj senĉese lulas ilin per rakontoj pri "kantantaj morgaŭoj". Ĉar, en nia humanista socio, la feliĉo ĉiam estas por morgaŭ. Tamen ni vivas ĉiutage - aŭ pli ĝuste: ni mortas ĉiutage - kaj estus pli normale, se ĉiu tago alportus sian feliĉo-porcion ĉiutage kaj egale al ĉiuj. Se mi bone komprenas, la ĉielo paradiza estas regata de la samaj fikomercistaj reguloj kiuj regas sur la

Tero, kaj nepre necesas antaŭpagi sian paradizan sidlokon antaŭ la eniro en Paradizon, same kiel ĉi tie oni antaŭpagas antaŭ ol eniri en kinejon.

Cetere, estas grava eraro prezenti Kristo-n nur kiel Dion de Amo. Se Li fakte diris: "Amu vin kiel mi vin amis", li diris ankaŭ: "Mi ne venis por unuigi sed por disigi." "Mi venis por ekflamigi fajron kaj kiom mi deziras ke ĝi ekflamigu!" (kaj de Henriko Barbusse ni ja scias ke fajro estas milito). Aliloke li diris: "Mi venis por frontigi la filon kontraŭ la patron, la filinon kontraŭ la patrinon, la bofilinon kontraŭ la bopatrinon". "En domo kie troviĝas kvin personoj, du spitos al tri kaj tri al du". Ĉu eblas nei tiujn Evangeliajn asertojn? Eĉ se oni ĉion trovas en la Biblio? En Francio oni kutime diras, ke la militistoj ĉiam malfruas unu militon; rilate la religiojn, mi opinias, ke la mistikistoj ĉiam malfruas unu "Biblion".

Pri raciismo kaj mistikismo, pro tio ke ambaŭ estas komponantoj neforigeblaj de la homa menso, ili bankrotos nur kiam la homo malaperos el la Tero. Atendante, oni nur provu aranĝigi kun ili. Kaj la grava malhelpo al tio estas: ne fanatike provi propagandi aŭ trudi ilin. Ĉiu faru sian propran sperton, ĉar: "Nur la manĝanto al malsato spitas kaj nur la trejnanto la trejnadon mem profitas".

En Eymet 1981/02/13.

B.G.D.

REUZITA PAPERŬ
oooooooooooooooooooooooooooo

Laŭ TK, eldonisto de "Monato", renkontita okaze de la UK en Stokholmo, tiu papero estas ne nur pli multekosta ol ordinara papero, sed terure polvumas, kiam oni presas ĝin.

Ĉu ni devos elekti inter la pulmoj de la presistoj kaj poŝtistoj, kaj la protekto de arbaroj, aŭ ĉu ne estas pli saĝaj solvoj en aliaj uzoj de rubpapero? Kiu ajn iam laboris en poŝta laŭspeciga centro certe komprenas kion mi celas... Vito.

Nia pasintjara felietono :

TRA EŬROPO per FERVOJO
kaj ESPERANTO ... (daŭrigo)

Bjalistoko

Mirige la trajno de Varsovio al Bjalistoko alvenis ĝustatempe. Ĉar mi tute ne konis la urbon kaj havis nur la adreson de Zenon skribitan sur papero, mi enviciĝis en la vintra nokto inter la atendantojn de taksioj. Post tri horoj mi iĝis la unua de la vico kaj povis enveturiliĝi.

Kun ĝojo mi revidis Zenon, kiun mi ekkonis tri jarojn antaŭe, kiam li venis min viziti ĉe mia amikino de GDR. Ni parolis pri komparaj moroj de diversaj popoloj. Zenon ne komprenis, kial mi bezonis iri al policejo tuj post mia alveno en Polio; li diris, ke tio estas manio de okcidentanoj, ĉar ankaŭ juna belgo, kiun li gastigis, volis urĝi al la policejo. Responde al lia miro, mi montris al li mian pasporton plenplenan de stampoj de GDR: ĉiufoje, kiam mi volis trapasi 8 tagojn en GDR, pleniĝis 3 paĝoj de mia pasporto, mi bezonis permeson por eniri, ateston, ke mi eniris, permeson resti, permeson foriri, ateston, ke mi foriris. Tial okcidentanoj, kiuj venas al Polio tra GDR, erare kredante, ke estas la sama folkloro en ĉiuj socialistaj landoj, tuj kuras por la unua pola stampo. Fakte poloj estas tre malstriktaĵoj pri paperoj kaj formalajoj (almenaŭ pri alveno kaj foriro de okcidentanoj), striktaĵoj ili estas nur pri mono.

Post tiu interparolo, la patro de Zenon alportis la manĝaĵojn, sed mi ne povis manĝi: malgraŭ mia vegetarano, pro miaj laborhoroj mi manĝas viandon en la universitata restoracio en Francio, sed polan altkvalitan viandon mi ne povis trovi manĝebla. Kvankam ŝi tute ne estas vegetarano, saman opinion pri pola viando iam esprimis al mi mia amikino de GDR, tiam mi ne emis ŝin kredi, ĉar germanoj ne kutimas al grandega amikeco al poloj, sed nun mi devas konfesi, ke ŝi tute pravus. Ĝojinde, Zenon ne ofendiĝis kaj konsentis, ke pri gustoj prefero oni ne parolu.

Nun mi devas satigi la malpaciencecon de ĝisostaj verd-

steluloj, kiuj riskas morton pro sufoko, leginte duonan paĝon pri Bjalistoko kaj ankoraŭ ne trovinte la nomon de la kara Majstro. Nu, jes, mi vidis la domon de Zamenhof, la Zamenhof-liceon kaj la kafejon, kie kelkaj konsumantoj parolas Esperanton.

Ankaŭ la Esperanto-klubon de Bjalistoko mi vidis. Tie estis gejunuloj, kiuj diskutis en pola lingvo pri la aferoj de la klubo. Sed verŝajne estas pli seriozaj kunvenoj, kiam ne estas ferioj. Jaŭdon la 27an de decembro, la vekilo sonoris tre frue, kaj poste Zenon vizitigis al mi la urbon. La tria telefonaŭtomato, kiun ni renkontis, konsentis informi lian entreprenon, ke hodiaŭ li ne emas konstrui socialismon. Lia kolegino ride diris: "Esperanto telefonas!" kaj la afero estis en ordo.

Ni iris al preĝejo, sed ne estis facile ĝin viziti, ĉar estis meso. Se estus la sama nombro da homoj dimanĉe en franca preĝejo, ĝojegus la pastro. Sed Zenon diris: "Estas preskaŭ neniu, nur maljunuloj kaj infanoj, nun la laboristoj laboras, post la laboro ili iros al la meso." Mi miris, ĉar estis jaŭdo la 27a de decembro, do ordinara labortago. Mi diris, ke en Francio laboristoj paŭzas inter la 12a kaj la 14a horo. "Ha, diris Zenon, tio estas oportuna, tiel la laboristoj povas iri al la meso dum la paŭzo". Mi diris, ke ne estas meso en Francio inter la 12a kaj la 14a, estas nur tagmanĝo. Sed Zenon ne ŝokiĝis, ĉar li ne iras ofte al preĝejo, li preferas aktivi por Esperanto.

Mi vizitis ankaŭ la palacon de iu hetmano, kies nomon mi forgesis, ĉar polaj nomoj ne estas prononceblaj por francoj. La palaco estas pli granda, ol la reĝa palaco sveda, kiun mi vidis en Varsovio, kaj ĝi havas la francan stilon de la epoko de Ludoviko XVa. En la enirejo estas statuo de la diablo.

Nun la hetmana palaco estas okupita de medicina biblioteko. Ĉar mi laboras en biblioteko en Strasburgo, mi povis dialogi kun bibliotekistino, kiu bone parolas la francan lingvon. Ŝi diris al mi, ke baldaŭ la biblioteko migros al alia konstruaĵo, liberigante la palacon por fari muzeon. Sed tuj post la dua mondmilito, pli gravis medicina biblioteko ol muzeo, ĉar ne nur la konstruaĵojn sed ankaŭ la polan popolan mem la nazioj celis detrui. Tial ankoraŭ nun la medicina fakultato ne estas

en la universitato, sed estas aparta fako, speciale zorgata de la ŝtato pro sia graveco por la rekonstruado de la lando. La kolegino demandis min pri bibliotekoj en Francio, kaj miris, ke en Francio, por 53 milionoj da loĝantoj, ekzistas unu altlernejo por bibliotekistoj, tiu de Villeurbanne apud Liono, kiu donas al 40 gejunuloj profesion formadon dum unu jaro. En Polio, estas 17 altlernejoj por bibliotekistoj.

Mi vizitis ankaŭ bibliotekon por laboristoj. Ĉar la kolegino miris pri mia aserto, ke al francaj bibliotekoj ne venas multaj laboristoj, mi diris ke, paradokse, la motivo eble estas, ke tio kostas malmulton: laboristo, kiu kutimas pagi inter 15 FF kaj 20 FF por vidi filmon, 60 FF por aŭdi kantiston, kiu ne iras al teatro nek operejo, ĉar tio kostas tro, ne imagas, ke paginte 5 FF li povos legi dum unu jaro tiom da libroj, kiom li deziras. Ĉar aĉeti librojn kostas multon, laboristoj kaj kamparanoj konvinkigis, ke legado estas afero de riĉuloj, kaj eĉ ne pensas informiĝi, ĉu estas alia maniero legadi. Kompreneble, tio estas nur teorio mia, sed oni devas klarigi la fakton, ke francaj bibliotekoj atingas 4% de la popolo, inter kiuj estas preskaŭ neniu laboristo aŭ kamparano. Mi menciis ankaŭ, ke en Strasburgo la municipo por prestiĝo konstruis unu grandan bibliotekon en okcidenta kvartalo de la urbo, ke tio estas bona por okcidentaj strasburganoj, sed ke en la orientaj kvartaloj de la vastega urbo estas nur mizeraj biblioteketoj, kiuj ne allogas suburbanojn.

En la biblioteko por laboristoj, ĉar mi tute ne komprenas la polan lingvon, mi rigardis la lernolibrojn por franca lingvo. Ĉar tion mi faris ankaŭ en GDR, mi tre miris, ĉar post 50 paĝoj la francino ankoraŭ ne vendis unu numeron de "L'Humanité" al ekspluatata laboristo. Kompreneble ŝi loĝas en Parizo, kaj korespondas kun varsoviano. Ne povas rakonti serioza lernolibro korespondadon inter francino el Hyds kaj polo el Wambierzyce. Post kelkaj lecionoj, la polo sufiĉe mastras la francan lingvon por viziti Francion, kaj li iras vidi la katedralon de Parizo, kaj krome tiun de Reims. Ŝajne poloj ŝatas vidi preĝejojn, sed la deziro viziti la katedralon de Strasburgo povas veni nur al lerninto de la germana lingvo. Mi tre miris, ke la francino aĉetadas je la 4a horo posttagmeze en la

vendejo de la Samarianino, kvankam ŝi profesie laboras. Vere tiu lernlibra francino havas vivon pli facilan, ol havas mi realulino, kaj poĵoj iom idealigas mian landon. Male GDRaj francoj ne estas veraj parizanoj, sed orientaj suburbanoj, ili laboras en uzinoj por akiri la minimuman salajron, kaj partoprenas kun entuziasmo en la festo de "L'Humanité". En iu el la GDRaj lernolibroj, kiuj iam falis inter miajn manojn, ili distris sin aŭskultante Yves MONTAND, sed la libro estis malnova, supozeble en la nuna eldono aŭdinda plu estas nur Jean FERRAT. Do, de unu socialista lando al alia, malsimilas ankaŭ... la francoj. Mi havis ankaŭ la okazon paroli kun skoltoj, ĉar Zenon estas responsa en tiu movado. Li kaj amiko lia miris, ke en Francio, kvankam ekzistas la laikaj pioniroj, la vorto skoltismo preskaŭ ĉiam signas movadon ligitan al la katolika eklezio. En Polio ekzistas nur laikaj skoltoj.

Ni iris al la stacidomo por akiri bileton por la trajno de Bjalistoko al Berlino Okcidenta, sed la biletistino diris, ke ne plu estas loko en tiu trajno. Mi diris, ke, se mi ne povos sidi, mi staros en la koridoro, sed ke mi devas esti en Berlino sabaton la 29an de decembro. La biletistino diris, ke tio ne eblas. Ĉar mi ne sufiĉe longe dormis, mi tre nervozigis, kaj demandis Zenon, kial ne eblas stari en koridoro de trajno. Li respondis, ke li ne scias, sed ke la trajno estas soveta, kaj ke supozeble, pro la ŝtatlimaj kontroloj la sovetoj de volas, ke estu pli da homoj en la trajno, ol estas da sidlokoj. Mi pli kaj pli nervozis, kaj diris, ke mi devas esti en Berlino la 29an, ĉar mi donis rendezuon al mia GDR-ana amikino, de kiu mi, pro tute ne konata motivo, ne plu ricevis leteron de 3 jaroj. Mi aldonis, ke tute certe la pola popola respubliko ne povas min perforte gardi pli longe, ol mi deziras resti sur ĝia teritorio. Zenon provis min retrankviligi, parolis kun la estro de la biletistino, kaj diris, ke ni devas reveni iom antaŭ la forveturo de la trajno, kaj ke intertempe la afero aranĝiĝos. Kiam ni revenis, mi ricevis bileton de Bjalistoko al Berlino, kaj pagis ĝin per slotoj, kiel mi antaŭvidis.

Dum la vespero de la 28a de decembro, mi adiaŭis

Zenon kaj iris en la soveta trajno de Leningrado al Berlino Okcidenta. Ĉar la bileton mi aĉetis tre malfrue, mi ne povis akiri kuŝlokon, kaj mi estis en sidkupeo kun junuloj. Alvenis la kontrolistino, rigardis mian rezervbileton kaj diris ion, kion mi ne komprenis. Unu el la junuloj provis klarigi al mi en angla lingvo, sed, ĉar nek li nek mi estas anglalingvanoj, mi miskomprenis, ke tiu ĉi vagono restas en Varsovio, sed ke mi havos lokon en alia vagono de la sama trajno. Do en Varsovio mi prenis la valizon kaj transiris al vagono kun la ŝildo "Leningrad-Berlin", pensante: "Se mi nur povas resti en la trajno, inter Varsovio kaj Berlino mi havos tempon por trovi mian sidlokon". Haltigis min kontrolistino, mi montris la bileton, kaj ŝi diris ion slave. Mi signis, ke mi ne komprenas, kaj ŝi per gesto nediskuteble ordonis al mi forlasi ŝian trajnon. Ĉar mi ekde miaj restadoj en GDR iom kutimas, ke estas ankoraŭ pli malfacile diskuti kun homoj en uniformoj, kiam iŝi estas inaj, mi foriris al la kajo, pensante, ke, se rusoj kaj poĵoj interkonsentis, ke mi restos en Polio, tio ja estas pli agrable ol veturi al la ĉefurbo de GDR, sed ke rendezuon mi havas en Berlino, kaj ne en Varsovio. Ĝojinde estis sur la sama kajo trajno de Varsovio al Berlino. Ĉar mi rimarkis vagonon kun la numero menciita sur mia bileto, mi serĉis en ĝi la ĝustan sidlokon. Kiam alvenis la pola kontrolisto, li parolis nur pole, sed lasis min tie sidi. Facile okazis la kontrolado ĉe la pola doganejo.

(daŭrigota!)

Jakelino.

Pri la lingvaj problemoj de Jakelino en Polio

tak estas dankon en la dana, sed tegmento aŭ plafono en la sveda kaj norvega (sved-norvega prononco kun longa a /ta:k/).

tack en sveda kaj takk en la norvega estas dankon, se prononcataj kun mallonga a (/tak:/).

tag en la dana signifas tegmento, en la sveda: preno, kapto, fojo, iom, krom aliaj signifoj en idiotismaj esprimoj.

La esperant/germana tag/o estas dag en la skandinavaj lingvoj

kaj "Gutten" en la norvega estas "la knabo", sed la u estas prononcata proksimume kiel en la franca (/y/) aŭ la germana ü (mi diras proksimume, ĉar la skandinavo ne nur distingas /u//y/ kaj /u://y:/ sed ankaŭ havas rondan duonvastan paron /u/ /u:/).

Do : "poliglotoj" estu prudentaj ! Vito.

Maljunulo rakontas :

Iam mi laboris en granda laboratorio. La Prezidanto mem venis por vidi, ĉu al ni io mankas. Li venis kun sia filo, knabo dek aŭ dekdujara, kiu neniam antaŭe vidis tian laborejon.

Kun hezito la knabo demandis sian patron : "Kion faras ĉi tie tiom da sinjoroj ?"

La Prezidanto respondis al sia filo : "Ili ellaboras necesajojn en ELEKTRONIKO..."

Post kelkaj minutoj la knabo redemandis sian patron : "Paĉjo, kio estas elektroniko ?"

Kun iomete da ĝeno la Prezidanto sin turnis al mi kaj diris : "Klarigu al li, kio estas elektroniko..."

Tion klarigi al knabo dek aŭ dekdujara, sen longa scienca preparo, ne estas tre facila afero. Do mi ne povis al li ekspliki tion ĝuste.

"Nu, mi diris, ci vidas sur la tablo multajn malgrandajn pecojn kun tre variaj koloroj, tre variaj formoj, kun aŭ sen ciferoj stampitaj... Ĉiujn tiujn pecojn ni interligas en sennombre multaj manieroj... Tio duktas monatojn kaj eĉ jarojn, ĝis iun tagon unu kombino funkcias.

Tre fiere, ni alvokas nian estron, por montri al li, ke tiu longa laboro estas kun sukceso finita kaj ĝuste en ĉi tiu momento nenio funkcias...

Ĉi tio estas E L E K T R O N I K O !"

-nn-

Alvoko por solidaro : La "paralela" disko-eldonejo "OXYGENE" (46 rue du Faubourg du Temple, 75011 PARIS) vendas kontraŭ 150 FF dek diskojn (sendependaj artistoj, bonkvalitaj kanzonoj, folk kaj rok-muziko, etna esprimo...) Viaj mendoj helpas ĝin venki financajn malfacilaĵojn. Petu informojn (franclingve). Laŭ komuniko de J.G.

S.A.T.-BROŜURSERVO

- * Jam komence de marto refariĝis disponebla "KIEL DIRI...?" Nunaj vendkondiĉoj : ĝis-4-ekzemplera mendo - po 15 FF + afranko. Ekde-5-ekzemplera mendo : po 12 FF, kun afranko inkluzivita.
- * Samtempe aperis la jam anoncita "Naciismo kaj Esperantismo" 76-paĝa broŝuro de kdo S.AARSE. (5FF)
- * Nun estas preparota reeldono de la bonega "Lingvaj Anguloj" de F. Baronnet. Stabila vendoprezio : 6 FF. Perfektiĝemuloj do ne hezitu. Prefere mendo ope pere de via grupo, por ne pagi la afrankon kaj eĉ ĝui 20% da rabato (ekde 50FF-a mendo).
- * La verkoj de E. Lanti ĉe SAT-broŝurservo : Elĉerpiĝis la kompilaĵo "El verkoj de E. Lanti". Restas disponeblaj jenaj tekstoj :
 - Absolutismo (nur dudeko da ekzempleroj en la de FLE presita eldono) ... 3 FF
 - Adamaĵoj (nur dudeko da ekzempleroj) ... 4 FF
 - La laborista esperantismo ... 2 FF
 - Vortoj de Kamarado E. Lanti (ofseta reeldono) ... 15 FF

VIVO DE "LAŬTE!"

Fine de marto estis registritaj 240 abonoj, kio esperigas por 1981 stabilan nombron da

legantoj, malgraŭ malapero de dudeko da abonoj antaŭe donace pagitaj de "mecenatoj".

Ankaŭ la aprila numero aperas pli frue ol anoncite. La venonta estas projektita por la komenco de majo, celante anonci i.a. la pentekostajn aranĝojn.

Bonvolu noti la adreson de nia peranto en Danio : Kdo Uwe LOHSE, Hojstrupvej 27B, DK 2720 VANLOSE.

Kribo.

Se vi deziras aperigi personajn sciigojn en la baldaŭ preparota "ADRESARO 1981" (korespondpetojn, pretecon gastigi, ktp), bonvolu ilin sendi al "Laŭte!" antaŭ la fino de majo !

JUS APERIS

Recenzo :

Petro Diksztejn,

Inter Sovetaj Popoloj

SAT-Broŝurservo 1981, 20 FF.

La senlaca SAT-Broŝurservo kaj ties ununura prizorganto denove plenumis konsiderindan laboron. Jen, sub la kutima severaspekta kovrilo, du dikaj volumoj, kiujn mi ne kuraĝus nomi broŝuroj. Sur bona papero, preskaŭ perfekte tajp-itaj, haveblas la travivaĵoj de pola judo en Soveta Unio dum la dua mondmilito sub la stalina reĝimo.

Pri la aŭtoro ni scias kvazaŭ nenion. Ĉu la libro longe serĉis eldoniston? Kiam ĝi estis verkata? Tiurilate ege utilis kelklinia prezento de la verkinto kaj de lia verko komence de la libro.

Post la invado de Pollando far la germana (kaj la soveta) armeo, la aŭtoro fuĝas al Soveta Unio, ne pro politika konvinkigo, sed precipe por koni landon pri kiu oni aŭdas tiom da kontraŭdiraj opinioj. Li rapide konvinkigigas, ke la stalina reĝimo estas nenio alia ol aĉega diktaturo kaj li rapide seniluziigigas pri la vivkondiĉoj, laborante en diversaj fabrikoj por salajroj malpli altaj ol en Pollando. Dezirante fuĝi reen al Pollando (kiu tiam ne plu ekzistas), li klopodas neleĝe atingi la landlimon sed estas perfidata de samgentano. Kondamnita je punlaboro li travivas plurajn jarojn en diversaj koncentrejoj, ĝis oni lin liberigas post kontaktoj inter sovetaj kaj polaj ŝtataj instancoj. Tiam li laboras en diversaj partoj de Sovetunio, precipe en la subevoluintaj aziaj respublikoj, en diversaj fabrikoj, kolĥozoj kaj inter diversaj aziaj popoloj. Filigrane troviĝas multaj suferoj, nesufiĉa kaj problema nutrado, nesufiĉaj salajroj, nesufiĉaj varoj, timo pro la polico, ĝis la fino de la milito, kiam li leĝe kaj definitive forlasas Sovetunion.

La leganto tute ne povas ĉerpi el tiu verko, kiagrade la soveta reĝimo ŝanĝiĝis poste; la sperto de la aŭtoro finiĝas ja en 1946, longe antaŭ la morto de Stalin.

Rapida rigardo al la manuskripto min konvinkis pri la taskego de la lingvo-korektintoj. Tamen la lingvo restas ege pezstila, en la cent unuaj paĝoj ĝi multe ĝenis min, poste, (ĉu pro alkutimiĝo, ĉu pro ŝanĝo de korektanto?)

ĝi iĝas senteble pli korekta, kvazaŭ ĝuebla, se konsideri, ke ĉefe la enhavo gravas.

Sed ĉiu esperantisto estas krome denaska posedanto de nacia lingvo. Kaj verkoj pri la soveta reĝimo en ĉiuj okcidentaj naciaj lingvoj abundas, ili eĉ ofte priskribas la postan evoluon de tiu reĝimo, ofte en bonega lingvo. (Indus menciis plurdekojn da aŭtoroj: Kravĉenko /jam en 1945/, Sojĵenicin, Ginzburg, Ŝalamov...)

Aperinte en la kvindekaj jaroj, tiu verko estus tute certe pionira, en la sesdekaj jaroj pliriĉiga. En la okdekaj jaroj ĝi alvenas tro malfrue kaj ripetas aferojn pri kiuj informoj ne mankas. Tamen estas kuraĝige konstati, ke ankaŭ la esperanta literaturo ne estas fremda al la nuna mondo; estas ege ĝojige informiĝi pri la stalinismo ne plu per nacia lingvo sed per esperanto.

Ĉu la libro estos novaĵo por la esperantistoj? Ĉu ili favore reagos ĝin legante? Ni esperu plian fojon, kaj nin konsolu, pensante, ke la libro, kiel kutime en nia medio, pro tro malforta merkato, tute certe longe atendis eldoniston, kaj finfine ĝin trovis dank'al la sindonemo de k-do Kribo.

NEPO

S E K R E T A J R I F O J

La sveda-rusa milito faris denove viktimojn en la Stokholma arkipelago. En tute simila maniero kiel pasintjare, alia soveta cisternŝipo "Thesis", la petrolŝipo "José Marti" grundadis ene de unu el la du ŝaneloj uzeblaj de ŝipoj venantaj de oriento. Oleo fluis, birdoj mortis, civitanoj pagos la fakturon sed ĉi-foje ŝipkompania profitamo ne okazigis la katastrofon. Fakte troviĝis piloto sur la ŝipo, kiu bone funkciis; sed la piloto ne konis grundon dekmeteran ene de dekmetra kurbo de la mapo, kaj tio sufiĉis ĉar la ŝipo estis plensarĝita. Kiu kulpas? La mapoj estas sufiĉe novaj en la regiono, kaj oni provis akuzi la komputoron. Sed fakte estas la militistoj, kiuj decidis pri kio aperas sur la mapoj kaj ili kaŝas multajn eksterŝanelajn grundojn nedanĝerajn por ordinara civila ŝipetaro. Same kiel en la "Thesis"-akcidento, montriĝis ke la rifo estis konata de la mapo-administracio. Ĉi-kaze ekde 1933. Kaj oni eĉ montris ĝin (daŭrigo p.18)

sur mapo de 1949 ! La intaj sekretoj verŝajne neniam ĝenos sovetajn militŝipojn, sed jam kostis multajn milionojn al la svedaj civitanoj, kiuj tamen, male al niaj flugantaj amikoj, ne perdis la vivon en tiu stulta milito.

Vito.

L A Ŭ T E - E K O L O G I O - L A Ŭ T E - E

Multaj legant(in)oj de "Laŭte!" estas ankaŭ fervoraj adeptoj de ekologiismo. Tial nia bulteno estas je ilia dispono por ĉiuspecaj informoj, alvokoj, debatoj, ktp, pri tiu fako. Ni krome memorigas pri la ekzisto de E.R.E. (Ekologia Rondo Esperantista), kiu ĝis nun aperigis la bultenon "Ekoperanto". Adreso : *****

Bert de Wit, Leidsevaart 52, NL 2114 AD VOGELENZANG. Pro tempmanko nia k-do ne aperigas tiun bultenon. Kiu povas konkrete helpi, por ke E.R.E. plu eldonu sian nepre necesan informilon ? Skribu al kdo Bert de Wit.

Laŭte.

NUKLEA TRUARO PROKRASITA ?

Vendrede 9/I/81 publikigis la sveda vespergazeto "Expressen" mapon "sekretan" pri la borlokoj de la geologia agentejo PRAV en tuta Svedio. La tasko de PRAV estas provi trovi sufiĉe homogenan kaj stabilan rokgrundon por konservi en ĝi dum jarmiloj rubojn de la nuklea industrio. Laŭ multaj geologoj la tasko en si mem ne eblas, sed ankaŭ surtere spertas PRAV malfacilaĵojn : la komunumoj kaj loĝantaro kontraŭas aŭ eĉ malbligas boradon kiam la planoj konatiĝas, kiel laste norde de Gotenburgo (Kymefjäll). Pro tio, oni provas esti kiel eble plej diskretaj, kio tute evidente malsukcesis ĉi-foje.

Vito.

Dentoj de mortintoj kiel media problemo : bruligu la avinon, sed enterigu la patron !

En Svedio la kremaciejoj estas gravaj poluciantoj, ĉar la hidrargo entenata en la dentistaj amalgamoj gasiĝas

dum kremaciado. La maljunaj svedoj havis malbonajn dentojn, pro tio plej ofte havas protezojn je tempo de morto, sed la pli junaj havas pli bonajn dentojn, tamen multe "riparitajn". Pro tio la hidrarga polucio el kremaciejoj kreskas kaj fariĝas samskala kiel tiu de la industrio.

Konkludo : mediuloj bone zorgu viajn dentojn !

(fonto : "Dagens Nyheter", januaro 81, ĉ. 20/I.) Vito

ĈIES TRIBUNO

Zamenhofa fallokratismo, eŭropa etnocentrismo, blinda fundamentismo...

Post 70 jaroj kaj malgraŭ la ida krizo, Valo (Laŭte n°24) nur dank'al Duc-Goninaz finfine malkovris tion, kio ĝenas preskaŭ ĉiujn junajn lernantojn de nia lingvo. Mi esperas, ke, kiel prava uzanto de "ci", li ekuzos la "fraton" de -in, nome -iĉ, proponita aliloke, ĉar latentita en la paro -nj/ĉj. Tiel viro estu sekse matura homo, virino kiel ĝis nun, kaj virino sekse matura maskla homo.

Oni do uzu "knabo" aŭ "ĉevalo" nedeterminate, kaj laŭbezone "knabino aŭ knabiĉo", aŭ "virĉevalino/virĉevaliĉo" ktp. Tiu reformo ne tre multon ŝanĝas krome - kaj tio tre gravas - principe, por homoj, sed certe faciligus skribadon kaj komunikadon en bestbredista fako. Plie, male al la ido-propono, la reformo estas enkondukebla sen krei konfuzon aŭ ĝenon.

Pri la pronomoj, se "ĝi" tro enradikiĝis kiel por-objekta, kial ne uzi "hi" por ŝi/li ? (Mi faris ĝin el la samsignifa finna "hän"). Cetere, kiel i.a. Wells atentigas en sia legenda "Lingvistikaj aspektoj de E-o", mankas la en multaj lingvoj ekzistantaj kaj plej racia distingo inter ni (inkluzive de la alparolato/j) kaj ni (ekskluzive de la alparolato/j). Kontraŭe al tute senutilaj ĝentilec-formoj de multaj lingvoj aŭ naŭzaj laŭkastaj formoj de aliaj lingvoj, tiu distingo fakte donas foje tre gravan informon, do optimunigas komunikadon.

Mia vidpunkto tute ne estas naturalisma : se mi ne estus akra kritikanto de etnocentrismo, mi certe estus idisto,

Ĉar Ido estas multe pli logika produkto en multaj rilatoj, kaj la ĵus legitaj rimarkoj de Couturat, tute trafaj kvankam - ĉar mi ekkonis ilin tre malfrue - ili havis neniun influon al mia sinteno, kiel siatempe spertis mia instruanto. Tamen mi koleras kiam mi pensas kiel reakcia verdula ŝafaro malebligis kaj daŭre sabotas forigon de la plej ĝenanta makulo en nia IL hodiaŭa.

Vito.

P.S. En la sveda homo en signifo Mensch estas māmiska kaj estas ina vorto, viriĉo estas man, virino estas kvinna, do tri malsamaj vortoj kaj klara distingo. Eĉ pli striktan distingon ŝajnas fari la finna.

PASKA MARSADO EN BRUSELO LA 18-an
DE APRILO 1981

Alvoko al kunlaboro

En aprilo 1980a la "Bertrand Russell Paco-Fondaĵo" lanĉis la kampanjon por Nuklea Senarmigo ("Nuclear Disarmament Campaign"), alvoko por krei zonan sen atomarmiloj en Eŭropo de Portugalio ĝis Pollando. En Britio por tio jam okazis manifestacio pasintjare. En diversaj landoj eminentaj figuroj subskribis la alvokon. ("For a nuclear-free Europe"). Agadkomitatoj en diversaj okcident-eŭropaj landoj (Britio, Belgio, Germanio, Francio) nun ekpreparis manifestacion je la 18a de aprilo en Bruselo, kiu havu internacian karakteron kaj kiu celos substreki la postulon en la alvoko lige kun la kreskanta danĝero de novaj etapoj en la atoma vetarmado.

En Nederlando eklaboris por organizi la partoprenon al la Brusela manifestacio la sekcio de la Internacio de Militrezistantoj kaj ĝi invitis diversajn politikajn partiojn, pacorganizaĵojn kaj mediajn grupojn. En Nederlando oni konceptas la sloganon "senatoma" Eŭropo ankaŭ tiel, ke oni invitos agadgrupojn kontraŭ atom-energio por kune protesti, kion ili akceptis. Sed en diversaj aliaj landoj oni ne tiel vaste konceptas la sloganon kaj sin limigas al agado kontraŭ atomarmiloj.

En Nederlando invitita por kunlaboro estis la Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE kaj ĝin mi reprezentis en du preparaj kunvenoj.

Montriĝis, ke en aliaj landoj kelkfoje la preparlaboroj estas same ankoraŭ malmultaj kaj en la lasta kunveno oni sciigis al mi, ke absolute ne venis respondoj de pacorganizaĵoj el la Skandinaviaj landoj, por ke ili ankaŭ almenaŭ letere - kaj se eblas per reprezentanto en Bruselo, kaj per manifestacioj en siaj propraj landoj - subtenu la alvokon.

Ankaŭ la kontaktoj kun la franca organizaĵo MAN ne estis tiel fruktodonaj ŝajne ĝis nun. Venos delegacioj el Hispanio kaj Italio.

Al vi, samlingvanoj kaj parte ankaŭ samideanoj, mi urĝe alvokas, kontakti kun vialandaj pacorganizaĵoj kaj mediaj organizaĵoj (laŭplaĉe) por interesi ilin pri la afero, eventuale sendi reprezentanton aŭ salutleteron, montri sian pretecon diskonigi la alvokon.

Ĉi-sube vi trovos la adresojn de la organizaj asocioj en diversaj landoj. Por solidardeklaroj oni sin turnu al la angla adreso aŭ la nederlanda (pro tio ke tie jam kunlaboras Esperantistoj).

Esperable, ke vi povos dediĉi iom da tempo al ĉi tiu unuaranga tasko, kaj dankante antaŭe por via kunlaboro,

amikajn salutojn,

Bert de Wit, F.L.E.,

Leidsevaart 52

NL 2114 AD VOGELENZANG.

Adresoj:

Britio:

Fred Hasson-Easter

Anti War March Committee

2 High Street

Blackshaw

Hebden Bridge

West Yorks. Britio.

Belgio: André Bogaert

VAKA,

Conscience Straat 46

B 2000 Antverpeno

Francio :

M.A.N.

20 rue du Devidet

F 45200 Montargis.

Germanio :

Gerd Greune/Hans Rondi

DFGVK

Rellinghauserstrasse 214

D 4300 Essen

Nederlando :

H. Branderhorst

't Kan Anders

Molenweg 14

NL 3941 PT Doorn

SONETAJ STRUMPFĴOJ

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

"Kvi, kvi, kvi! Jen sur tegmento
Kantas beleta birdeto."

(konata kanzoneto)

La aŭror' kun rozkoloraj ravaj fingroj
Ekradias en mallumo de l'etero.
Nova Tago komenciĝas sur la Tero
Kaj vekigias homoj jam pro mildaj vibroj.

Sin disstreĉas ripozintaj lacaj membroj
Dum rapidas la malluma malapero.
Freŝa viglo disfluiĝas kun prospero
Kaj devige sin disigas la palpebroj.

Al la lumo sin rifuzas la okuloj
Dum la sonĝoj fore fuĝas tra l'nebuloj
De l'vakuo nenieca, senespera.

Ellitiĝo, purigado, forveturo
Al l'uzino por laboro ĝisvespera,
Rezigninte dormripozon...sen plezuro.

Kiu scios min redoni vekoĝojon ?
Kiu scios findetrii mian scion ?
Kiu scios min redoni novkonscion,
Ke la rondo min ne taksu kiel ĝojon ?

Sed maleblas malpravigi mian vojon.
Ankaŭ veron malkonfesi kaj racion.
Mi ricevis de spertado promocion
Tro amaran : mi ne spitos plian fojon.

Pro certeco sensenciĝas la espero ;
Sen espero malbeniĝas ĉiu vero
Kaj aspektas ege stulta la ekzisto.

Ĝi fariĝas ŝafmigrado senelira
Forpelata de pastraro kun persisto
Al buĉejo pro koncepto plej delira.

Sojle de novjaro mortas la espero.
Ŝiras sin vualo de l'viviluzio.
Nete konturiĝas nun Mondovizio,
Lumas la certeco, plufinvenkis klero.

Lume elradias senmistera Vero.
Riveliĝas vana pia fantazio.
Krudas realeco en malsimpozio
Dum kolokvoj zumas kaj kraŝas sen pero.

Al la tuthomaro sin mensogo trudas ;
Laikismo lupas, mistikismo hundas,
Larmas krokodile logikismo vulpa.

Majstre la gangsteroj la popolon mastras.
Elsangigas homojn fisistemo polpa
Kaj sur krurprotezo humanismo plastras.

Nu, vekigu vi, kompanoj laboremaj !
Vi plej haste tabulumu senripoze,
Senespere, senutile, senmoroze,
Sen postuli pri respondoj nesistemaj.

Vi ne zorgu pri demandoj nur dilemaj :
Viajn Majstrojn firme fidu malsupoze ;
Vi alvenu al la Cel' apoteoze
Sen koncedi al skrupuloj persistemaj.

Tra l'popolo, dank'al viaj agoj spitaj,
La konceptoj, en la keloj instruitaj,
Disaŭdiĝu sur tegmentoj de l'Novtago.

Sed, iluminitoj, nun vi certe scias
Kia estos fino de l'konscia plago :
Nur de merd' al merd' per merdo l'Homo dias.

Tia estas la Realo efektive.
Ĉio, ĉiam forfluadas plu senlimen,
Sen atingi finon de la vojo lumen,
Ene-elen, ĉime-ĉilen, konjektive.

Pro l'influo magnetisma, plej aktive,
De la Mikrokosmo, rekte Makrokosmen,
Dank'al "Mezokosmo" kaj re-Mikrokosmen,
Eternigas sin la Vivo memkreive.

En la Kosmo-Homo la ĉielo "Teras".
Ĝi kun Mikrokosmo kiel ponto peras
Per "sunlumo", vera sango de l'Naturato.

Same per la Morto Homo liberiĝas,
Pro l'influo magnetisma, sen prokuro,
Kaj en "Grandan la Merdujon" renaskiĝas.

A-men!

P.N. : Mi estas denaska memstaranto, nebaptito kaj profano. Do mi ŝuldas nenion al la Altaro nek al la Templo. Ekster mia nacia civitaneco mi mem estas mia propra obedienco. Komprenoble, mi ne pretendas atingi al la perfekta frenezeco de la gravaj saĝuloj, kiuj nian Mondon tiel majstre regas. Mia frenezeco estas nur primara, infan-balbutado, kaj nur la Sennoma rajtoplene inter ni mem juĝu. Komprenoble, mi tute senkulpigas mian gardisto-servanton B.G.D. pri ĉio ĉi-supre skribita kaj kiun li nur trudite raportas.

J. Ŝ.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Eymet 1981/02/13.

Nome de Julo Ŝtrumpfo
raportas B.G.D.

Pri la rajto je pigro :

Iu Bell Wall proponis en la sveda gazeto "Expressen" 790811 adopton de 28-hora laborsemajno. Oni elektu inter 4 sephoraj kaj 7 kvarhoraj labortagoj. Aparta propono por la laborobstinuloj : ili laboru 14 horojn dum 2 tagoj. Aliajn tagojn ili tial povos alie klopodi mallongigi sian vivon sen doni malbonan ekzemplon al siaj kolegoj. Rimarkinde estas, ke eĉ nun, 1981, kiam milionoj estas senlaboraj en Eŭropo, mallongigo de la labortempo estas kvazaŭ maldeca propono en ĉi perversa lando, kie nova leĝpropono altigas la limon de laŭleĝe nenebla krom-laboro de 150 ĝis 200 horoj jare. Laborabstinema Vito.

Romaj vikingoj : La sindikatisma semajna gazeto "Arbeta-
***** ren" sendis leteron al kunlaboranto en Roma. Poŝtisto verŝajne kolego de Jaklin faris sian devon kaj post iom da tempo la letero revenis portante stamp-markon "adresito nekonata" kaj datstampo de la Vatikana Romo. Dume, vikingido sur la insulo Gotland estis atendinta stokholman leteron....

Vito.

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO
PER BICIKLO KAJ ESPERANTO

La 26an de majo 1930, ĉe la ĉina-manĉuria-sovetia limstacio Radziesk n-ro 86.

La lastan etapon ĝis tie mi faras sen incidentoj. En la grundo svarmas truoj pro obusoj, torpedoj kaj tranĉeoj. Antaŭ tri monatoj tie ĉi plagis la milito. Oni sin preparis por longdaŭra milito. Same kiel ĉie, min frate akceptas la fervojistoj, la doganistoj kaj la lingardistoj. Malproksime staras kurteno el pikdratoj al rivero Argun, kiu disigas ambaŭ landojn. Sur la montetsupro, maldekstre, je ĉ. 3 km., aperas urbo Manĉuria, unua manĉura stacio. La vetero estas bela, la tereno valo- kaj herboplena. La transirado de la landlimo estis ridinde facila kompare al la trimonata klopodado por akiri vizon !

(...)

Haylar, la 31an de majo 1930

Hieraŭ, la tutan tagon mi biciklis en la dezerto aŭ pli ĝuste rande de Gobi-dezerto. Nuraj vivantaĵoj : bovaroj, ĉevalaroj kaj ŝafaroj gardataj de grandaj uloj migdaloj kun tanita haŭto... veraj sovaĝuloj. Sed mi ne donas aĉigan sencon al la vorto "sovaĝa", ĉar reciproke, laŭ ili, la "sovaĝuloj" estas ni, la blankuloj... La ĉefa obstaklo estis por mi la vento, kiu transportas nubojn el blanka sablo. Tiaj nuboj sufokus kaj eĉ poste tute kovrus onin, se oni ne zorge ŝirmus siajn okulojn, siajn naztruojn kaj orelojn. Tial ĉiuj vualoj, per kiuj sin ornamas tiuj indiĝenoj el la dezerto. Sed por novulo la spektaklo estas vere grandioza. Oni vidas la dunsuprojn fariĝi kaj detruigi en nepriskribeblaj kirliĝoj sub plumba suno. Tio iel similas "furiozan maron", sed estas ja maro el blanka, maldika, eĉ nepalpebla sablo, kiu ĉien ensovaĝas ĝis en la faldoj de la plej zorge ŝirmataj subvestoj. En kelkaj minutoj, ankaŭ la reloj estas submergitaj kaj en la plej riskoplenaj sektoroj oni starigis "kontraŭsablajn barilojn" por ŝirmi la fervojon.

Subite, malantaŭ duno, oni ekvidas stacion. Kion povas ja fari tie tiu domo kaj tiu kompatinda, ekzilita staci-estro kaj lia familio ? Senutilas substreki, ke sur tiuj vojpartoj ĉio kaj ĉefe la akvo devas esti zorge transportata kaj stokata en kirasitaj kaj speciale ŝirmataj cisternvagonoj.

Vere tiuj nekutimaj pejzaĝoj kredigus, ke oni atingas alian planedon, se ne estus la ŝtala rubando kaj la fajron kraĉantaj monstroj, kiuj zorgeme cirkuladas en tiuj sektoroj.

En tiaj kondiĉoj kaj en tiu spiritostato je la 19a mi atingas Haylar, polvokovrita, ŝvitanta kaj soifanta, kvankam kunportinte ladbotelon da akvo, kiun mi rapide malplenigis.

Stacio Buksedu, la 3an de junio 1930

De tri tagoj min pli-malpli senmovigas nebuloj, tre densa pluveto. Hierau mi tamen sukcesis alveni tien ĉi post 30 kilometroj tra preskaŭ dezerta montara regiono. Mi devis peti la permeson ruliĝi en tunelo. Elrinte, mi troviĝis en belega montara cirko. De malsupre mi vidis la fervojon grimpantan sur la flankoj de la montaro per sinsekvo da grandiozaj kurbiĝoj. Tio konsistigis unu el la plej belaj artverkoj, kiujn mi iam ajn vidis en miaj vojaĝoj, sed pro tiu malseka vetero mi havis multe da malfacilaĵoj por supreniri laŭ tiuj kurbaj krutaĵoj kun glitigaj reloj. Mi devis eĉ malmunti mian aparaton kaj suprenpuŝi ĝin kun la biciklo kaj la pako tra la montaraj mallongigaj vojetoj - nekutima alpisma heroaĵo. Kaj tiel, nur post longa tago da ŝvitado, en neforges-eblo natura - kio ege kompensis mian penadon - mi atingis la stacion Buksedu.

Kompreneble, tuj ĉe mia alveno min kaptas la policistaro, kiu ne kredas siajn okulojn, zorge ekzamenas min kaj miajn pakojn kaj demandas min interalie : "Ĉu vi estas judo ?" Unuafoje oni faras al mi tian demandon. Eble pro la legendo de la Vaganta Judo ? Kaj subite mi komprenas ĉiujn malamojn, miskomprenojn kaj rankorojn, kiujn ĉie en la mondo suferas la juda popolo...

(...)

En Ĥarbino la 11an de junio 1930

Memorinda tago por mi. Je la 8a mi iris al la stacidomo por renkonti ĉe halto de la transsiberia trajno kvar eminentegajn japanajn esperantistojn, veturantajn al la internacia esperanto-kongreso en Oksfordo. La ĉefdelegito estas direktoro de grava japana ĵurnalo. Kompreneble, plian fojon nin fotis kaj intervjuis la loka kaj internacia gazetaro.

Je la 14a min gastigis S-ro P., eminenta meteorologiista esperantisto, UEA-delegito, ĉe kiu mi retrovas niajn japanajn amikojn. Lia "burĝa" gastamo neniel malsuperas la tradicion rusan gastamon. Al ni servas du ĉarmaj ĉambristinoj delikatan manĝon kun tre variaj almanĝaĵoj, vodko, kukoj... kaj en tiu esperantista etoso nekonata de la neinicitoj. En la ĉeestantaro troviĝis alia japano, S-ro Osako, kaj ĉino S-ro Tsin-Si-Tsin, altfunkciisto. Tio estis vere internacia kunveno, kie mi plian fojon ĝuis la subtilan plezuron, kiun havigas nia universala lingvo, ĉar neniu kunmanĝanto povis esprimi sin krom en esperanto.

Por fini la vesperon ni iras al ĉina restoracio, kie nin oni servas, kompreneble, ĉinmaniere. Por manĝi ni havas la famajn korn-bastonetojn. Kvin minutoj sufiĉas, por ke mi lernu uzi ilin mallerte. Efektive, per tiuj magiaj bastonetoj kaj laŭ la manĝo-aranĝo ĉiu elprenas kion li volas, manĝas kiom li volas kiel li volas, rekte el la komuna plado al sia buŝo. Trinkajoj ? Dum la manĝado nenio, krom akvo por ceremonie tralavi sian buŝon post ĉiu el la tre multaj pladoj prezentataj. Mi vidas pladon, kiu unuavide aspektas kiel dikaj fazeoloj. Rigardante de pli proksime, mi ekkonscias, ke temas pri dikaj raŭpoj similaj al blankaj vermoj. Mi ŝtelrigardas la kunmanĝantojn kaj vidas, ke trankvile ili metas tiujn raŭpojn en sian buŝon. Regante mian naŭzon mi same, malgraŭ mia subita paliĝo. Nu, tio estas bona, eĉ bonega ! Mi rekoloriĝas dum malaperas mia naŭzo. Tamen estus mensogo diri, ke mi manĝis multon. Fine de la manĝo, sama ceremonio kiel ĉe la komenco : malsekaj manĝotukoj, lavado de la buŝo kaj de la manoj. Cigaroj.

* * *

(daŭrigota)

ALFA-BETA

Directeur & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut.
Commission paritaire de presse n° 58651.

Semajno-fino en AVINJONO

(28/2 - 1/3/81)

E-VIVO

Kvin komencantoj ĉeestis en la nova porkomencanta kurso, kiu funkcias en la Junula kaj Kultura Domo "Croix des Oiseaux" en AVINJONO. La kvin partoprenis antaŭ 12 tagoj en la semajno-fino organizita de la Vaŭkluzo Federacio en Kastelo BARBIERE. Pozitiva efiko do. Plie, partoprenantino sekvas la perkorespondan kurson de Simone HUMM.

Nivelo A : (veraj komencantoj). Resume, inter la 8 vaŭkluzanoj kiuj sekvis la porkomencantan kurson en BARBIERE, 6 decidis daŭrigi la lernadon kaj... efektiviĝis ilia intenco!

Inter la 6 ceteraj, ne vaŭkluzanoj, troviĝis 4 infanoj el AIKSO, kaj maroka studentino.

Niveloj B kaj C : Pro materialaj kaŭzoj, ni ne povis disponi pri la lernoĉambroj de la nova domo : la hejtigaparato ne funkciis. La nivelo B (inter A kaj C!) kaj la nivelo C (atesto pri lernado) kune lernis per vid-metodo, gvidita de Simone HUMM, Clarisse MOUNIER kaj Helene GENTE. Ĉirkaŭ 20 staĝantoj ĉeestis, tre diversnivelaĵ kaj tre diversaĝaj.

Nivelo D : (almenaŭ nivelo de Atesto pri praktika lernado). Ok staĝantoj profitis la instruadon de Michel DUC GONINAZ. Inter ili, Aiksanoj, Nimesanoj kaj Vaŭkluzanoj. Ni ne forgesu hungarinon !

La restado : 54 enskribiĝis en tiuj E-kursoj. 47 partoprenis. Inter ili, nur 28 profitis la tutan restadon.

Ni havis la agrablan surprizon akcepti Renée TRIOLLE, sekretariino de UFE, kiu vizitis ĉiujn nivelojn.

Oportuna estis la staĝo, opiniis studento pri ĥemio en MARSEJLO. Li perkoresponde lernas kaj la unuan fojon li aŭdis E-on !

Eks-inspektoro pri elementaj lernejoj diris, ke jam de kelkaj monatoj li interesiĝas, deziras komenci la lernadon kaj tamen ne komencis. Por li la staĝo en Barbriere estas kvazaŭ "subakviĝo" kaj nun li devas naĝi !

Pli oportuna estus tiu staĝo en la komenco de la lerna jaro, diris RISPAL. Ĉiuj konsentas kun li.

Heterogenaj estis la partoprenintoj. Tro streĉa estis la laboro por la junuloj, opiniis Arlette DUC GONINAZ.

Marta KOVACS komentariis diapozitivojn pri BUDAPESTO en Barbriere. Tio estis post la kafo dimanĉon. Al neniu urĝis la tempo viziti la trian kurson !

Estonta esperantista agado : GENTE anoncis ke "ESPERANTO-VAUCLUSE", la trimonata ligilo de la sendependa vaŭkluzafederacio, aperos kvar fojojn venontan jaron, anstataŭ tri. Oni sendu al li (9 avenue des Erables, 84000 AVIGNON) kopion pri la loka agado antaŭ la unua de oktobro, de decembro, de februaro, de aprilo.

KARPENTRASO sciigas ke, sabaton la 7an de Marto okazos prezentado de filmo pri Brazilio. (Sukcesa estis tiu kunveno : 50 partoprenintoj). Tiu loka grupo, kiel pasintjare, prizorgos regionan piknikon la 28an de Majo. La aprila bulteno donos ĉiujn klarigojn necesajn.

Jean MAGNAN (AIX) (42-23-04-76) proponas al ĉiuj semajnfino en rifuĝejo "Grand Cap" apud SOLLIES-PONT (Var) la 20an kaj 21an de junio.

Zamenhof-Tago : Se efektiviĝos en AIKSO kanzon-recitalo la 12an de Decembro, la regiona Z.T. ne okazos. Se ne, nia amikino Janine SHERRER, kiel decidite pasintjare en GADAGNE, prizorgos tiun renkontiĝon en sia lernejo en ORGON. Informojn vi trovos en la oktobra ligilo.

Veselin D A M J A N O V en PERPIGNAN !

La fama esperantista bulgara kantisto Veselin Damjanov partoprenos la 73-an francan kongreson, kiu okazos de la 5a ĝis la 9a de Junio en Perpignan. Dum la Arta Vespero, sabaton 6an de Junio, en la Palaco de la Kongresoj en Perpignan la partoprenantoj ĝuos la plezuron aŭdi la belan voĉon de Perpignan.

Aliĝu, sen prokrasto, al la franca kongreso skribante al "Kultura Esperantista Centro", 72, Avenue du Général de Gaulle, 66000 PERPIGNAN. Tel. (68)34.22.18.

Denove havebla ĉe "Cercle espérantiste de l'Agenais" :
DICTIONNAIRE DE POCHE (presita eldono). Ĉiu ekzemplero 12FF
+ afranko laŭ jenaj kondiĉoj : Francio
1 ekz. 2,20FF - 2 aŭ 3 ekz. 4,30 FF - 4,5 aŭ 6 ekz. 6,30FF
7 ĝis 13 ekzempleroj 9 FF. Por eksterlando : duono el
tiuj prezoj por la afranko.